

esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 4 / 2012



Saluton Kara Legantaro !

Kiam mi skribis tiujn liniojn, ni ĵus revenis de Metabief en Francio kie okazis **FESTO**-n. La magio kaj «mojosa» etoso de la ĉiu-vesperaj koncertoj kortuŝis nin. Ankaŭ ni spektis bonegan teatraĵon de la grupo «Kvak». Samtempe okazis la italan kongreson en **Mazaradelvalo**. Se vi aŭskultus la lastan radio-elsendon de «Varsovia Vento» aŭ de «Pola Retradio» (28/08), vi rekonus eble belgajn voĉojn parolante de tiu evento.

Sur la kovril-bildo, ni konceptis modestan artaĵon kiu estas ankaŭ ludon : Trovu la 7 erarojn ;-). Preskaŭ ĉien videblas la originala bildo de fama nuna filmo (en revuoj, eĉ surstrate, ...kaj ankaŭ sur la paĝo11 ;-)). Ni prenis nur la mezan parton de tiu konata bildo. Kompreneble, neniam kaj neniel ni volas ofendi iun per tio.

Ni deziras ankaŭ aldoni kelkajn vortojn pri Vinilkosmo kiu ege bezonas nian subtenon. Vizitu la tt-ejon www.vinilkosmo.com !



Vinilkosmo produktas muzik-trezorojn (kiel interalie, la lastan albumon de **Zhou-Mack**).

Por kontraŭi tiun malfacilan epokon, la talentega muzikisto/kantisto **Gijom Armide** provas registri sian albumon alimaniere (www.miprovi.info). Flo' (el Vinilkosmo) kaj Gijom prelegis kune dum FESTO por klarigi kaj proponi alternativojn, kiel la uzado de la artista datumbazo artista.ikso.net . Esperantaj muzikoj travivu diskokrizon.

Ni esperas ke vi partoprenis tiusomere renkontiĝojn, koncertojn, ktp ... Ke vi renkontis novajn kaj malnovajn amikojn ... Ke vi simple bonfartas !

Laur' & Samy
aktuala@esperantobruselo.org

Enhavo

- Paĝo 3 : **Eventoj**
- Paĝo 4-5 : **Tutmonda KER ekzameno**
- Paĝo 6 : **Zsofia en Tuluzo**
- Paĝo 7 : **Arkones**
- Paĝo 8 : **Artista Datumbazo surrete**
- Paĝo 9 : **Min Produktas vi (mi pro vi)**
- Paĝo 10 : **KuPro - KuKo**
- Paĝo 11 : **Movi, kanti, revo + origina bildkovrilo**
- Paĝo 12-13 : **Kiel Eo aldoniĝis en Google Translate**
- Paĝo 14 : **Tento de la plej granda malbono**
- Paĝo 15-16 : **Vojaĝlibro de Cirilo kaj Roz' : Francio**
- Paĝo 17-19 : **Vizito de Rumanio kun krozado tra Danuba Delto**
- Paĝo 20 : **Prezento de la albumo de Zhou-Mack : Originoj**



36a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957.

Prezidanto : Angelos Tsirimokos ; prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com

Sekretario : Laurent Loisse : sekretario@esperantobruselo.org

Abona membriĝo : 10 eŭroj jare, konto **IBAN** : BE64 0000 1230 4852, **BIC** : BPOTBEB1 de la Esperantista Brusela Grupo

Kunvenejo : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono . **Informoj** : www.esperantobruselo.org

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo



Agendo

Kontrolu la ĝisdatigojn sur nia nova retejo
www.esperantobruselo.org



Septembro 2012

Merkredo la 12a	Unuaj postferiaj kunveno kaj kursoj
Sabato la 15a	1a KuPro (Vidu paĝon 10)
Merkredo la 19a	Semajna kunveno kaj kursoj
21a -> 23a	Arkones (Vidu paĝon 7)
24a -> 29a	SemEo (Vidu paĝon 14)
Merkredo la 26a	Prelego : Heidi Goes pri Indonezio

Oktobro 2012

Merkredo la 3a	Semajna kunveno kaj kursoj
Sabato la 6a	Eo-Kafejo + vizito de Louvain-la-Neuve. http://cafe-eo-bxl.weebly.com/
Merkredo la 10a	Prelego de Bernard-Regis Larue «Vojaĝo al nanoplanedo»
Merkredo la 17a	Semajna kunveno kaj kursoj
20a - 21a	1a KuKo (Sabato kaj dimanĉo) (Vidu paĝon 10)
Merkredo la 24a	Semajna kunveno kaj kursoj
Sabato la 27a	2a KuKo (Sabato kaj dimanĉo) (Vidu paĝon 10)
27a -> 3a Novembro	AŬTONE (Grésillon - Francio) (Vidu paĝon 14)
Merkredo la 31a	Semajna kunveno kaj kursoj

Novembro 2012

Sabato la 10a	2a KuPro (Vidu paĝon 10)
Merkredo la 14a	Prelego de Vlad'ka Chvátalová pri "Benino - lando de voduo"
17a - 18a	Eŭropa rendevuo de Stella Plage (Morbecque - Francio)
Merkredo la 28a	Jara Ĝenerala Asembleo de EBG

Decembro 2012

Sabato la 15a	Zamenhofa Festo en Kamilou (Mundo-b / Bruselo)
----------------------	--

TECAMAC - MEKSIKO



ARRAS - FRANCIO



BUSAN - SUD-KOREIO



KATALIN KOVÁTS



Monda ekzameno KER 2012 : Sukceze !!!

Sume 360 personoj (!) en 29 urboj de 17 landoj sabate la 9-an de junio partoprenis en la plej granda ĝisnuna sesio de lingvoekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). La ekzamensesion organizis la komisiono de UEA pri ekzamenoj, kies ĉefrespondeculo estas Katalin Kováts, kaj ĝi jam

altiris la atenton de multaj amaskomunikiloj en diversaj landoj.

Post plurjara preparlaboro, en decembro 2008 UEA lanĉis sian novan internacian ekzamensistemon, kiu konformas al la postuloj de la Konsilio de Eŭropo, kaj difinas la lingvosciajn

La sistemo de la Konsilio de Eŭropo difinas lingvoscion de nivelo A1 (plej baza) ĝis C2 (plej alta). El la ses ekzistantaj niveloj, la KER-ekzamenoj de UEA nun estas ellaboritaj por la mezaj niveloj B1, B2, kaj por la alta nivelo C1.



JEKATERINBURGO - RUSIO



KURITIBO - BRAZILIO



KUALA KANGSAR - MALAJZIO

Pli ol kvindek homoj en diversaj landoj de monatoj preparis la plej grandan ĝisnunan komunan ekzamenon, kiu komenciĝis je la 9-a mezeŭropa horo en sep eŭropaj landoj - kaj samtempe en Tokio, kie estis la 16-a horo, en Malajzio kie estis la 15-a horo, en Jekaterinburgo, kie estis la 13-a horo, en Moskvo kie estis la 11-a horo. Samtempe komenciĝis ankaŭ la ekzamenoj en Helsinko kaj Rigo, kie estis la 10-a horo. Unu el la ĉi-fojaj KER-ekzamenoj okazis en La-Chaux-de-Fonds, kie havas sian sidejon la Eperanta Civito. La Civito dum lastaj jaroj sen granda sukceso klopodas disvastigi sian propran ekzamensistemon, bazitan sur la Komuna Eŭropa Referenckadro. Tamen en la Civita dialekto de Esperanto, la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) nomiĝas Komuna Eŭropa Framo de Referenco (KEFR).

Je la horo kiam okazis la KER-ekzamenoj en Eŭropo kaj Azio, ankoraŭ dormis la loĝantoj de Ameriko. Tial dua bloko de la ekzameno okazis kelkajn horojn pli malfrue, por la loĝantoj de Meksiko, Kolombio, Brazilo kaj Argentino. La granda ekzamensesio estis nur skriba, kaj tial eblis ĝin aranĝi samtempe en multaj landoj, rakontas Katalin Kováts:

- Por gvidi la skriban parton ne necesas speciale akredititaj lingvistoj kaj lingvoinstruistoj, sufiĉis ke ni trejnu fidindajn personojn kaj zorgu tamen pri relative rigoraj administraj sekurpaŝoj. Farinte distancatrejnadon rete pere de mesaĝoj kaj instrufilmoj, kelkfoje ankaŭ telefone kaj skajpe estis pretigitaj 60 personoj, kiuj kunagadis en 29 lokoj, kaj tiel ni sukcesis ebligi ankaŭ al tiuj ekzameniĝi, kiuj ne povus vojaĝi al tiuj grandaj aranĝoj kie okazas kompleksaj sesioj.

Libera Folio: Kian utilon havos la ekzamenoj de sia atestilo?

- Se al iu gravas aparteni al tiu ĉi movado, lerni bone la lingvon, flegi ĝin, verŝajne utilos kaj gravos ankaŭ iom oficialigi tiujn konojn, ĉu por oni mem, ĉu por la familianoj, najbaroj, ĉu por profesiaj celoj. Sed pli serioze: en kelkaj lokoj la ekzameno rolis kiel kursfina taksado, valoris el movada aŭ universitata vidpunkto. Bonŝance, en pli kaj pli da lokoj oni jam fieras pri posedo de KER-atestilo.

La rezultojn de la ĉi-foja sesio oni certe konos nur post unu monato. La paperoj estos senditaj al Budapeŝto, kie ilin taksos du sendependaj korektantoj, unu post la alia. Poste la ekzamenoj povos vidi siajn poentojn en

speciala retpaĝo de la hungara lingvoekzamena centro ITK. Sed alispecaj rezultoj estas videblaj jam nun: en multaj landoj informoj pri la tutmonda ekzameno aperis en diversaj amaskomunikiloj. Post la ĉi-foja sesio la suma kvanto de ekzamenoj proksimiĝas al milo. La plej multaj ekzamenoj sukcesas en la testo; fiaskas, laŭ Katalin Kováts, malpli ol kvin procentoj.

- Okazas ke sukcesas ĉiuj partoprenantoj. La risiko malsukcesi estas plej granda en la parola parto, pro la aŭdkomprena testo, do, nun estas malpli da risiko fiaski, ĉar temas pri nur skriba ekzameno.

- Sekvafoje KER-ekzamenoj okazos (*NdlR*: «okazis» nun) en Slovakio dum Somera Esperanto-Semajno en julio, en Vjetnamio dum la Universala Kongreso, kaj en Italio dum la Itala Esperanto-Kongreso en aŭgusto. Dezirantoj povas anonci sin en la retejo Edukado.net.

Libera folio - 23/06/2012





Pri mia volontulado en Tuluzo



(FOTO : Kun Niko kaj Françoise)


Post mia naŭ monata volontula sperto en Bjalistoko, mi havis la bonŝancon, ke mi daŭrigu la volontulan laboron en Francio, ĉe la Tuluzo Esperanto Kulturcentro. Mi alvenis en la lastaj tagoj de majo, kaj mi restis ĝis la unua semajno de julio. Tuluzo unue ŝajnis grandega urbo por mi, ĉar mi antaŭe neniam vivis en simila urbo. Unue estis malkutima, sed mi rapide ekŝatis ĝian buntecon kaj viglan vivon. Ĉiutage okazis koncertoj, spektakloj, festivaloj, kiujn mi ofte vizitis, eĉ estis malfacile elekti foje. Mi havis okazon konatiĝi kun la lokaj esperantistoj jam la unuan semajnfinojn, kiam ni veturis al la montaro, kie okazis staĝo por esperantistoj, kiuj deziris trapasi la KER-ekzamenon okazintan en Tuluzo. La belega pejzaĝo mirigis min kaj estis tre agrable pasigi semajnfinojn kun multaj amikemaj esperantistoj. La lernantoj havis lecionojn ĉiutage, ni kuiris hungaran pladon, ni ludis kaj ni promenis en la vilaĝo.

Post la staĝo, mi kontribuis la esperantan vivon de la urbo, mi vizitis la lecionojn, komencantan kaj progresantan, mi partoprenis la rektan ĉiusemajnan radioelsendon pri Esperanto, kie mi estis intervjuita esperante, tradukite al la franca.

Krom tio regule okazis manĝoklaĉoj, kion multo de la tuluzanoj vizitis por babili nur (!) esperante kaj kompreneble manĝi kaj trinki. La tuluzo kulturcentro ankaŭ partoprenis festivalojn, kie eblis reprezenti Esperanton. Ni pasigis unu semajnfinojn en la Monda Terfestivalo, kie ni konigis la internacian lingvon al multaj interesatoj. Kiam ne estis esperantaj programoj, mi ĝuis aliajn kulturajn programojn de la urbo. Tion faciligis la ĉekoj, kion junuloj favorpreze povas aĉeti, kaj ĝi rajtigas senpage aŭ tre malmultekoste viziti kinejon, koncerton, teatron, kaj eĉ la „Spacurbon”.


Mi havis la eblon viziti pliajn urbojn en la regiono, por konatiĝi kun kiel eble plej multe da esperantaj grupoj. Ĉie kien mi iris, atendis min tre amikemaj kaj helpemaj homoj, kiuj gvidis min en la urboj kaj helpis al mi ekkoni la lokajn historion kaj tradicion. Dum la turneo mi tranoktis ĉe diversaj esperantistoj kaj esperantaj familioj, kaj estis tre bele vidi, ke la lingvo vivas kaj la parolantoj aktivas en ĉi tiu parto de la lando. Mi partoprenis la lecionon aŭ la monatan programon de la kluboj, aŭ speciala renkontiĝo estis okazigita pro mi, kien venis multaj interesatoj. Laŭ ilia deziro, mi prelegis aŭ gvidis babilrondon pri Hungario, por konigi al homoj mian kulturon, tradicion, kaj manĝojn. Ĉiuj aŭskultantoj estis tre entuziasmaj, kaj pro la multaj demandoj, la babilado ĉiam plilongiĝis. Dum mia unu monato kaj unu semajno mi vizitis inter alie la sekvajn urbojn: Albi, Lavour, Foix, Les Bordes-sur-Arize, Verniolle, Tarbes, Bagnères-de-Bigorre, Pau kaj Donneville. Mi dankas por ĉiuj la gastigemon kaj la bonajn spertojn, kiujn mi travivis!

ZSÓFIA



Arkones

Artaj Konfrontoj En Esperanto



21.23.09.12
ARKONES
POZNAŅ

ARKONES

(ARTAJ KONFRONTOJ EN ESPERANTO)

Arkones estas sendependa **kultura kaj arta esperantista aranĝo** en Poznań, Pollando.

Ĝi estas certe unika kaj unu el la plej grandskalaj manifestacioj de Esperanto-kulturo.

La programo certe boninfluos vin !

Arkones

Por junularo !



aparte bonvenigas junularon.

Pro tio oni antaŭvidis favorajn rabatitajn prezojn por junuloj < 25j. kaj por membroj de Pola Esperanto-Junularo (ili partoprenas senpage!).

Aparte avantaĝo estas malmultekostaj flugoj al/el Poznań. Kun fluglinioj WizzAir kaj RyanAir oni povas akiri biletojn jam (ofte) ekde kelkaj Eŭroj.

Fondaĵo Antoni Grabowski (FAG), starigita antaŭ pli ol dudek jaroj dank' al donaco de s-ro Adam Goralski, celas subteni la Esperantan kulturon. Ĝi aljuĝas premiojn kaj subvenciojn meze ĉiun duan aŭ trian jaron.

Legu pli --> arkones.org

partneroj

E@I
EUROKKA
Muzaiko
TEJO
UEA

Artista Datumbazo estas
komunuma reta portalo, kreita ĉefe
por kunligi artistojn, teknikistojn kaj
organizantojn por helpi kaj faciligi la
organizadon de kulturaj aranĝoj.

Ĝi estis fondita en 2003 kaj nun
revigligata de nova kunlabora
teamo. Artistoj kaj organizantoj,
estu bonvenaj enskribiĝi, ĝisdatigi
kaj pliriĉigi ĝin.



artista@ikso.net

Muziko, teatro, literaturo, video,
foto, desegnarto kaj multe pli.
Jen la nova Artista Datumbazo.



...> artista.ikso.net <...



Ĉu vi deziras
plivigli
esperantan
muzikon ?

Igu pirata
produktisto !

Paĝo 9

« Min produktas vi » estas nova projekto, pere de kiu ĉiuj povas partodoni en la produktado de tutmondeca muziko, komence per la unua esperanta albumo de Gijom' Armide.

Kion fari ?

- ✓ Diskonigi la projekton
- ✓ (Prunte)doni monon

La produktaĵoj estos
Libere kaj senpage elŝuteblaj.

Pli da informoj ĉe :

miprovi.info

Post Kuko venas ...



Pasintjare, deko da personoj sekvis pli-malpli regule KUPROjn (KURsojn por PROgresantoj). Por tiuj, kiuj ne scias pri kio temas aŭ kiuj forgesis tion, jen rapida rememoro :

KUPROj estas kompletaj tagoj de kurso po unu proskisume ĉiujn sesajn semajnojn. La unua okazos sabaton la 15-an de septembro 2012. La aliaj kupraj renkontiĝoj en 2012 okazos sabaton la 10-an de novembro kaj sabaton la 8-an de decembro. Estos ankaŭ tri kuproj komence de 2013. Por sekvi la kurson, necesas esti je la nivelo B1 (aŭ je bona nivelo A2). Post 4 tagoj de intensivaj kursoj de KUKO, vi normale trafas tian nivelon. Kompreneble al kurso estas nur en Esperanto (per rekta metodo).

Pago (fotokopioj, varma tagmanĝo, trinkaĵoj kaj kukoj dum la paŭzoj, ktp) : 15 eŭrojn (pro facileco surloke pageblajn).

André Demarque ademarque@skynet.be

portebla telefono : 0486 516085 / hejma telefono : 010 412925

Frandu nian kvaran KUKO-n



Ni invitas vin al nia KURso por KOMencantoj), kiu okazos en Loveno-la-Nova (universitata urbo, proksime al Bruselo). La kurso daŭras 25 horojn dum du sinsekvaj semajnfinoj (la 20/21-ajn kaj 27/28-ajn de oktobro 2012). La kurso estos gvidata nur esperante, tial ĝi estas malfermita al ĉiuj.

La kursoj estos gvidataj de :

Françoise Pellegrin
instruistino (EBG)



André Demarque
organizanto de KUKO



Lode Van de Velde
instruisto - nederlandlingvano



PAGO : **75** eŭroj / La gejunuloj de mapli ol 26 jaraj pagas **40** eŭrojn

Pagas nur **60** eŭrojn :

- la membroj de Kvinfolio, APE, EBG, FEL, pagintaj la kotizon
- tiuj kiuj estos sekvintaj la kurson de Marc Vanden Bempt la 6/7-ajn de oktobro en Leuven
- tiuj kiuj partoprenos KOKOn POSOn de la 2-a ĝis la 4-a de novembro en Delft
- tiuj kiuj ankaŭ aliĝas al la sekvonta KUPRO (kurso por progresantoj la 17-an de novembro)

Pageble je la konto : [BE18 9795 3655 1865](https://www.bic.be/bic/ARSPBE22) (BIC ARSPBE22) de DEMARQUE ANDRE
Por tiuj kiuj venas el alia lando (aŭ tro malproksime por reiri hejmen sabate), ni trovos loĝejon ĉe Esperantisto.

-> SENDU vian aliĝilon al ademarque@skynet.be



La grandega grupo Google kaj Cirque du Soleil (**Cirko** de la Suno) montris novan projekton kies nomo estas en Esperanto.



La nomo estas "**Movi. Kanti. Revo**". La prezentado volas elmontri la novan tri-dimensian labor-manieron de la interreta **navigilo** Google Chrome. Temas pri sperto por la sentoj, kiu esploras novan formon por navigi en la komputila mondo.

La parto-prenantoj sekvas **misteran** gastigantaron kaj uzas signojn kaj sonojn por navigi en la ĉirkaŭaĵo kreita de la cirka grupo. La retejo uzos senteman teknologion por kapti la movojn. Nek Google, nek Cirque du Soleil parolis pri la utiligata teknologio. Oni ankaŭ ne klarigis la kialon de la elekto de nomo en Esperanto.

La publikigo okazos en Septembro.



Plena kovrilbildo ne transformigita



Kiel Esperanto aldoniĝis en

Google Translate

Publikigita Majo 15, 2012
de [Marek Blahuš](#)



Ekde la **22-a de februaro 2012 Esperanto** ĉeestas inter la lingvoj subtenataj de [Google Translate](#), la plej konata maŝintraduka programo, senpage uzebla per la interreta adreso <http://translate.google.com>. La aldonado de Esperanto kiel 64-a lingvo surprizis la esperantistojn kaj kaŭzis ondon de entuziasmo, sed ankaŭ kritikon de la kvalito de la produktataj tradukaĵoj. Tamen regas konsento pri tio, ke la paŝo de Google estas grava reklamo por Esperanto kiel vivanta lingvo. Revuo Esperanto akiris ekskluzivajn informojn pri la fono de tiu decido.

Ĉe maŝintradukado necesas distingi inter du bazaj aliroj al la problemo: Regulbazita, kiu uzas vortarojn kaj gramatikajn regulojn verkitajn de lingvistoj, kaj statistika, kiu uzas algoritmojn verkitajn de programistoj per kiuj la maŝino aŭtomate lernas el granda kvanto de dulingvaj tekstoj jam antaŭe tradukitaj de homo. La Google-Tradukilo apartenas al la dua kategorio. Tial ĝi ofte eraras pri la akuzativo aŭ ne rekonas iun kunmetaĵon, sed pro la sama kialo ĝi scias foje surprizi per eleganta esprimo aŭ konas vorton kiu ne aperas en multaj vortaroj.

Per tiu aliro la programisto ankaŭ povas prilabori iun lingvon eĉ sen devi kompreni ĝin, kaj anstataŭ okupiĝi pri unu konkreta lingvoparo li povas koncentriĝi je plibonigo de la tradukalgoritmo kiel tuto.

La tekstoj per kiuj Google trejnigas sian tradukilon venas ĉefe el libroj (Google mem [ciferecigis multajn](#)), de organizoj kiel UN, kaj el retpaĝoj.

Multaj esperantistoj scivolas pri la eksterordinara favoro de Google, kiu jam en 2007 en reklama video konsilis al la uzantoj de sia retpoŝta servo [Gmail](#) profiti la tempon ŝparitan de ĝia spam-filtrilo por fari ĝuindajn aferojn kiel ekzemple lerni Esperanton (la videon ĉe <http://www.gmail.com/fightspam> spektis 1,5 milionoj da homoj), kaj kiu en 2009 [omaĝis](#) la 150-an jubileon de Zamenhof per portempa ŝanĝo de sia emblemo kaj igis 2 milionojn da homoj serĉi informojn pri li kaj Esperanto en Vikipedio.

Pro tio revuo Esperanto sin turnis rekte al Google, kiu afable donis respondojn al la demandoj de la esperantistoj.



Thorsten Brants, profesia sciencisto laboranta por Google, informis ke neniu el la inĝenieroj rekte envolvitaj en la aldonado de Esperanto mem parolas la lingvon, kaj klarigis ke fakte estas sufiĉe kutime ke la teamo okupiĝas pri lingvo kiun neniu el ĝiaj

membroj denaske scipovas. Kelkajn el la 64 subtenataj lingvoj eĉ ne parolas iu ajn el la tuta dungitaro de Google.

Tio tamen ne estas la kazo de Esperanto: *“Ekzistas eta Esperanto-komunumo ĉe Google kiu helpis pritaksi la kvaliton de la sistemo, kaj Franz Och, kiu gvidas la projekton Google Translate, lernis iom da Esperanto kiel infano,”* malkaŝis Brants. *“Pasintjare ni trovis tradukistojn kiuj tradukis al Esperanto niajn testajn*



datumojn, kaj je nia granda surprizo ni konstatis, ke kvalito de la Esperanto-sistemo estis komparebla kun lingvoj

por kiuj ni havas multe pli da datumoj, kaj ke ĝi estis multe pli bona ol ĉe ĉiuj lingvoj por kiuj ni havas same malmultan datumkvanton – sen ke ni iel ajn speciale klopodis tion. Tial, post iom da poluro kaj plia testado, ni decidis ke venis la tempo por lanĉi ĝin.”

Kiel Brants konfirmis, kvankam la programo scias traduki ekz. inter Esperanto kaj la ĉina, nuntempe ĉiuj tradukoj al kaj el Esperanto okazas pere de la angla kiel interlingvo. Ĝuste por ĝi Google kutime disponas plej multajn jam pretajn tradukaĵojn, kaj ne ekzistas plano aldoni aliajn rektajn parojn por Esperanto. Li tamen invitis la esperantistojn kontribui al plibonigo de la tradukilo korektante la tradukojn (per musklako sur erara vorto) kaj taksante ilin “helpema”, “nehelpema” aŭ “ofenda” (per la eta kontrolmarko sube dekstre en la rezultokampo).

Eblas ankaŭ uzi la programon [Google Translator Toolkit](#) por redakti kaj alŝuti tradukaĵojn. La faritaj ŝanĝoj ne definitivegos tuj, sed ebligos al la tradukilo pliboniĝi en la estonto. **P.S.** Post la apero de tiu ĉi artikolo en revuo Esperanto, en aprilo 2012, ni ricevis sciigon de **Peter Rybín**, slovaka tradukisto kaj esperantisto, kiu informis ke la firmao **SDL** (evoluganto de la tradukprogramo Trados) antaŭ kelkaj monatoj dungis lin por traduki kelkajn mallongajn tekstojn el la angla lingvo en Esperanton. La laboro estis mendita de Google, evidente rilate al la testado de Google Translate, kiun en la intervjuo menciis Thorsten Brants.



Sugesto:

GoogleTranslate ne estas perfekta, sed ĝia forta flanko estas la ligiteco al aliaj servoj de Google: Voĉon de angle parolata video en [YouTube](#) nun eblas aŭtomate rekonigi kaj la subtekstojn tradukigi en Esperanton.

Provu spekti la paroladon de Steve Jobs en Stanford ĉe <http://tinyurl.com/jobsc> (klaku la ruĝan butonon “CC” sub la video, elektu “Traduki priskribojn BETA” kaj en la falmenuo Esperanton).



LE MONDE

diplomatie en Esperanto



TENTO DE LA PLEJ GRANDA MALBONO

de Serge HALIMI

Kion Obama farus el dua mandato de usona prezidanto, post esti ne plenuminta la promesojn de la unua ? Refoje, sistemo firme ŝlosita de du partioj, kiuj konkuras per siaj favoroj al la afermondo, devigos milionojn da usonanoj rezignacie elekti inter la malbono kaj la plej malbono.



LA USONA financa gangreno kaŭzis mondan ekonomian krizon, kies rezultoj estas konataj : malkresko de dungoj, bankroto de milionoj da proprietuloj de nemoveblaĵoj, malfortiĝo de la sociala protekto. Tamen, kvin jarojn poste, pro la de stranga paradokso, neniu povas tute ekskludi, ke en la Blankan Domon venos homo, s-ro Willard Mitt Romney, kies eksterordinaran riĉaĵon li akiris per spekula financo, per delokado de laborlokoj kaj per la (impostaj) ĉarmoj de la Kajman-Insularo. La fakto ke li elektis la parlamentanon s-ro

Paul Ryan kiel respublikanan kandidaton por la vicprezidenteco ebligas vidon al tio, al kio Usono povus simili, se venontan novembron la elektantoj cedus al la tento de la plej granda malbono. Dum s-ro Barack Obama jam akceptis planon por redukti la buĝetan deficiton, kiu amputas la socialajn elspezojn sen altigi la „nenormale malaltan” nivelon de la impostoj por la altaj enspezoj, [Vd „Ĉantaĝo en Vaŝingtono”, *Le Monde diplomatique*, aŭgusto 2011], s-ro Ryan juĝas tiun demokratian kapitulacion tute nesufiĉa.

Bonvolu legi la sekvon surrete : <http://eo.monedediplo.com/article1857.html>

SemEo

La semaine de l'Espéranto à Toulouse

Du 24 au 29 septembre, nous vous proposons une semaine de rendez-vous autour de l'espéranto, concert, conférence, débat, ateliers, expos...

http://www.esperanto-midipyrenees.org/articles/dossier.php?val=283_semaine+esperanto+toulouse

+ AŬTUNE +

Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj.

Kursoj, koncertoj, muzikado, mantraj, promenado, ludoj, kaj aliaj aktivaĵoj laŭ via elekto.

Specialaj gastoj : Svetlana Smetanina el Moskvo kaj Kees Ruig el Nederlando.

de sabato, 27-a de oktobro ĝis sabato, 3-a de novembro 2012,

en la fama **kastelo Greziljono**, franca Kulturdomo de Esperanto.


Detalaj informoj en reto: www.gresillon.org/autune

Kontakto: kastelo@gresillon.org, tel. 0033-2.41.89.10.34

Adreso: Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, F-49150 St. Martin d'Arcé

Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'

19/09/2008
- 01/10/2008



Prologo - Francio



(1101 km)

Ni ekbiciklas malfrue en la posttagmezo. Ni ankoraŭ troviĝas en la Pariza regiono kiam venas tempo por tranokti. Iu afabla familio proponas, ke ni tendumu sur ĝia ĉedoma herbejo. Dum Cirilo nokte starigas la tendon per kapa lampo, Roz' elsakigas siajn dormaĵojn. Ŝi ne trovas sian dormsakon. Evidentiĝas, ke ŝi forgesis ĝin hejme.

Ni decidis, ke Cirilo dormos sole en la tendo kaj Roz' trajnos al la ankoraŭ apuda Parizo por reakiri sian sakon. Hejme, kvankam ŝi serĉas en ĉiuj anguloj, ŝi daŭre ne kapablas trovi ĝin. Cirilo kontrolas en la sakoj de Roz' kaj en dek sekundoj trovas la tiom deziratan dormsakon. Ĝi trovigis en tutnova kaj tiom efika premsako, ke Roz' ne vidis ĝin en la mallumo.

Post bona dormo en vera lito, Roz' matene reatingas Cirilon kaj ni kune daŭrigas nian vojaĝon sur kvietaj vojoj.

Ĉe la rivero Luaro, ni atingas vilaĝon, kies ĉefa trajto estas posedi multajn originalajn leterskatolojn. Iuj estas herooj de bildstrioj, aliaj rilatas kun la profesio aŭ ŝatokupo de la loĝantoj, aliaj estas tute fantaziaj.



Dum ni instaligās por tranokti, Cirilo troblovas en sian aermatracon, kies internaj kudraĵoj rompiĝas, kio faras parton de la matraco dika bulo. Li do devas dormi sur sia matraco sen aero kaj matene ja doloras liaj lumboj. Tiu aĉa afero okazis sabate vespere. Estos neniu espero trovi malfermitan sportvendejon dimanĉe. Plia tia nokto estas antaŭvidebla.



Ioma muskola malstreĉado post longaj horoj surbicycle

Dimanĉe matene en Francio kutime trejniĝas multaj biciklistoj. Kelkaj salutas nin per tiaj amikaj vortoj: "Saluton, sakuloj"! Sed ekde la tagmezo, cxuiuj kvazaŭ magie malaperas.

En vilaĝo, ni sovaĝe tendumas en stadiono de vilaĝo. Matene, vidas nin la gardisto kaj, anstataŭ la atenditaj riproĉoj, li invitas nin por kaf- kaj teumi. Li ankaŭ donas al ni valorajn informojn por atingi grandan sportvendejon en Bourges, kie ni aĉetas novan aermatracon por Cirilo.

Alian fojon, dum ni ekserĉas lokon por tendumi en vilaĝo, iu aŭtomobilanto haltigas nin per mansignoj. Je nia surprizo, li invitas nin por tendumi en ĝardeno apud lia domo. Ni ankaŭ ricevas la permeson duŝiĝi en lia hejmo kaj li eĉ kuiras por ni.

Li nomiĝas Sylvain kaj ankaŭ li kutimas vojaĝi. Li vivis en Alasko plurajn monatojn

kaj spertas pri kajako. Li jam kajakis supren sur la tuta rivero Luaro, la plej longa de Francio, kaj li eĉ trakajakis Nord-Amerikon. Pri tiu aventuro li eĉ montras al ni tre bele presitan libron en la franca: "Je la fontoj de Kanado" (Aux sources du Canada). Dum ni dormas en lia ĝardeno, li nokte laboras kaj revenas kiam ni vekiĝas, en ĝusta momento por proponi al ni matenmanĝon.

Baldaŭ prezentiĝas la unuaj deklivoj de Centra Masivo, la montaro en la centro kaj sudo de Francio, kiuj iome malkreskigas nian rapidecon. Por dormi, iu familio supre de deklivo post Saint Eloy les Mines invitas nin starigi nian tendon en ĝia garaĝo normale uzata por amasigi ĉiujn ludilojn de la infanoj. Niaj gastigantoj neatendite kuiras tutan manĝon por ni. Dume, multimema kato provas ŝteli niajn proprajn nutraĵojn el niaj sako.

Ni nun ja atingis la montaron. La deklivoj fariĝas pli seriozaj kaj lacigas nin. Roz' tiom lacas ke, dum ŝi ĵus haltis en vilaĝo, ŝi falas de la biciklo, feliĉe sen gravaj konsekvencoj. Ŝi ne plu havis sufiĉan forton por deiri de ĝi. Siaflanke, Cirilo iomete suferas je la dekstra maleolo pro ankoraŭ freŝdata vringiĝo.



Ne ĉiuj suprendeklivoj estas surbicycleblaj, foje necesas paŝe puŝi.

(sekvenda)

VIZITO DE RUMANIO KUN KROZADO TRA DANUBA DELTO

de la 4-a ĝis la 14-a de junio 2012

Rodica Todor, la prezidantino de IFEF organizis vojaĝon tra Danuba delto kun vizito de la urboj Bukureŝto kaj Braŝovo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Ni pasigis kune agrablajn 11



tagojn. La aventuran aranĝon partoprenis grupo de 34 esperantistoj el 9 landoj. Unue ni konatiĝis kun la ĉefurbo Bukureŝto. Ĝi estas unu el la plej gravaj turismaj allogaĵoj kaj la plej granda urbo de Rumanio kun pli ol du milionoj da enloĝantoj. Ni loĝis en hotelo *Hello* situanta proksime de la Norda stacidomo. Vizito al impona *Palaco de la Parlamento*, kiu enhavas 6 000 ĉambrojn ravis nin. Ĝi estas la dua plej granda konstruaĵo en la mondo post la Pentagono. Ankaŭ *Palaco Cotroceni* estas grandioza. En ĝi troviĝas La administrejo de la rumana prezidento kaj Nacia muzeo. Bukureŝto estas vivplena urbo kaj havas tre belajn parkojn kaj ĝardenojn. Ni promenis en tiu de *Cismigiu* kaj poste tra la malnova centro. Tre interesa estis vizito de skanseno (subĉiela muzeo) *Dimitrie Gusti*, kie ni konatiĝis kun diversaj kolektaĵoj de konstruaĵoj el diversaj partoj de Rumanio.

Post tritaga restado en la ĉefurbo ni per buso translokiĝis al la urbo Tulĉa – loko, kie ni enŝipiĝis por tritaga krozado. En Tulĉa ni vizitis ekologian turisman muzeon por konatiĝi kun la deltaj faŭno kaj floro antaŭ ol vidi ĉion per propraj okuloj. Ni navigis sur du kunigitaj hotelŝipetoj. Eblis senĝene trairi de unu ŝipo al la alia. Ni manĝis kaj dormis sur ili. Post la halto ĉe la

marbordo de la riverego Danubo ni per malgranda boato navigis al danuba rezervejo tra kanaloj, foje inter flavaj kaj blankaj nufaroj por observi birdojn en la naturo. Tio estis interesa spektaklo. Ni vidis plurajn specojn de birdoj. Inter la plej konataj estis cignoj, pelikanoj, ibisoj, cikonioj, kormoranoj kaj amaso da aliaj. La plej vidinda estis la renkonto kun nestantaj kormoranoj. Ili okupis pluretaĝe la arbojn kaj kriis laŭtege alportante manĝon al siaj idoj. Ni ankaŭ vizitis fiŝistan vilaĝon *Mila 23*. Post tiu-ĉi neforgesebla travivaĵo ni revenis per buso al Bukureŝto. Survoje ni mallonge haltis ĉe la bordo de la Nigra maro kaj poste ni tagmanĝis en restoracio Murfatlar meze de vitejoj. Ni partoprenis gustumadon de kelkaj vinoj kaj manĝis lokan specialaĵon.

Nia posta celo estis la urbo Braŝovo. Ĝi situas en montara regiono ĉirkaŭ 166 km norde de Bukureŝto. Survoje al ĝi ni vizitis la montaran urbeton Buŝteni. Rekte super la urbo staras grandega kruco videbla jam de malproksime. Ĉar la bela vetero tion permesis, ni supreniris per telfero al la altebenaĵo de Buĉeĝi. De ĝi ni admiris grandegajn ŝtonojn, inter kiuj sfinkson, boleto-fungojn kaj aliajn formojn de ŝtonegoj. La panoramo de la vasta ĉirkaŭaĵo ravis nin. La Buĉeĝia montaro en Transilvanio estas la plej vizitata loko en Rumanio kun la plej alta pinto Omul - 2505 metrojn super la marnivelo. Ni ankaŭ traveturis Sinaion - luksan turisman centron, kie okazas diversaj eventoj kaj vintre oni organizas tie sportajn aranĝojn.

En Braŝovo ni loĝis en malnova hotelo *Coroana* situanta en la centro de la urbo. Tie ni renkontiĝis kun lokaj esperantistoj kaj pasigis kun ili agrablajn momentojn

dum vespermanĝoj. Rodica, kiu loĝas en tiu ĉi bela urbo, promenis nin tra ĝi kaj montris al ni la plej interesajn vidindaĵojn. Poste ni vizitis la kastelon *Bran*, kiu situas je 30 km for de la urbo. Ĝia famo estas ligita al la legendo pri la grafo Drakulo, sed neniu historia dokumento atestas pri lia ĉeesto tie. Nuntempe estas en ĝi Muzeo pri feŭda historio kaj arto. Revenvoje ni vidis la fortikaĵon Raŝnov, kiu estas nuntempe en rekonstruo.

Sekvan tagon, en la vilaĝo Prejmer ni



admiris la fortikigitan preĝejon, la plej bone konservitan en orienta Eŭropo. Ĝiaj eksteraj muroj kaj aliaj fortikaĵaj partoj defendis kontraŭ malamikoj. Nun la preĝejo estas sub la protekto de "Unesco". Ne malpli interesa estis la vizito al la sinaja ortodoksa monaĥejo. Ĝi estis fondita fare de princo *Mihai Cantacuzino* en la deksepa jarcento kaj estas tre bele dekorita. Impresis nin la reĝa kastelo *Peleș* kun belega interno konsistanta el 160 ĉambroj. Ĝi estas la antikva somera rezidejo la reĝo de Rumanio *Carol I* (1866-1914). La korton ornamas vico de statuoj kaj bele aranĝita promenejo. Tiu ĉi kastelo estas nuntempe unu el la plej vizitataj en Rumanio.

Rodica montris al ni multajn belajn kaj allogajn lokojn: preĝejojn, kastelojn, muzeojn, mirindan naturon kaj aliajn

interesajn vidindaĵojn. Ĉio tio estis spicita per ŝia bonhumoro, rideto kaj sindonemo. La suno akompanis nin ĉiutage. Ni manĝis en belstilaj restoracioj, konatiĝis kun rumana historio, renkontis afablajn homojn kaj ĝuis agrablan etoson. Ĝi estis mirinda vojaĝo kun neforgeseblaj travivaĵoj, certe ripetinda. Ni daŭre sentas nostalgion pri tiom riĉaj kaj plezurplenaj tagoj.



Liba Gabalda



Fabela lando havanta naturajn belaĵojn, montarojn, maron, pitoreskajn vilaĝojn, grandiozajn urbojn, riĉan kaj diversflankan kulturon. Tio estas Rumanio.




Parlamento



Bukureŝto



RUMANIO



Skanseno



Krozado sur Danuba Delto



Nestantaj kormoranoj



Ce Nigra maro



Montaro Buĉeĝi



Braŝovo



Kastelo Bran



Prejmer

Junio 2012



Kastelo Peleŝ



Monaĥejo





La unua tutesperanta
albumo de

Zhou-Mack

Se **Zhou-Mack** estas nur je sia unua verko komplete dediĉita al la Internacia Lingvo, li tamen delonge ne plu estas komencanto, ĉar li jam havis multajn muzikspertojn kun konataj personoj kiaj *Chico Freeman*, *Archie Shepp*, kaj *Ravy Magnifique*, inter multaj aliaj, inkluzive tre fruktodonan vivsperton kun la bando *La Fève*. Ankaŭ lia unua kontakto kun esperanto datas de lia infanaĝo, ĉar tiu lingvo estis jam integrita en la tradicion de lia deksex-infana familio, same kiel la muziko, jam ĉiomgrava kiam li estis nur knabeto.

Lia renkontiĝo kun *Jah Lucky*, konga rasta muzikisto vivinta en Francio, estis baza influo por Zhou-Mack. Kaj la senĉesa kunesto kun tiu iniciatinto al regeo dum li studadis literaturon kaj regule ludis zairan rumbon kun deinfanaĝaj amikoj, certe vekis lian scivolon kaj precizigis la filozofion kaj la artan sentemon de Zhou-Mack, kiu de tiam neniam ĉesis strebi al idealo.

De lia naskurbo, Kimpese en Zairo, ĝis en Europo, trairante Nederlandon, Belgion, Francion, kaj multnombrajn spertojn tiel sur homa kiel sur arta niveloj, la vivvojo de Zhou-Mack al tre persona vidmaniero pri la vivo povis nur inspiri lian kosmopolitan kaj miks-etnan manieron komponi kaj ludi; kaj bedaurinde por la kulturaj `administrantoj`, inkluzive tiujn de Mobutu, se Zhou-Mack konsideras muzikon unuavice kiel liberecon ! Tra simbiozo de nordaj kaj sudaj ritmoj, kaj kondenso de bonaj vibroj, *Originoj* estas laborfrukto de pluraj jaroj kun multnombraj ĉiuflankaj kunlaborantoj; kaj kiu, kiel indikas sia nomo, kondukos vin al la **originoj** de tiu varma, kolorplena, kaj originriĉa muziko.